

LA PROGRESO

OFICIALA ORGANO DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: PRAHA-VII. SÔCHARSKÁ 333.

Jarabono (10 numeroj) Kĉ 20.—, fremdlando: bonvaluta Kĉ 25.— (5 sv. fr.) malbonvaluta Kĉ 15.— (3 sv. fr.) Konto de la ĉekoficejo Praha n-ro 34.271.

N I A P E N T E K O S T O

Proksimiĝas Pentekosto, kiu laŭ la tradicio de nia movado estas dediĉata al la naciaj kongresoj esp. Same kiel samideanoj britaj, francaj, germanaj, italaj k. a., same la esperantistoj de nia respubliko kunvenos la 7.—9. Junio por preparoli en nordbohemia urbo Liberec (Reichenberg) la aferojn de la movado en nia lando kaj por manifesti ĝian vivon al la neesperantista publiko. En iu punkto ĝi diferencos de la aliaj naciaj kongresoj: ĝi estos kunveno internacia, ĉar ĝin partoprenos ne nur Ĉeĥoj kaj Slovakoj, sed ankaŭ Germanoj, Hungaroj kaj eble Poloj de nia respubliko, kaj traktos per internacia lingvo.

La ambaŭ Naciaj Societoj (Ĉeĥoslovaka Asocio kaj Germana Ligo) prezentos tie siajn raportojn pri la stato de nia afero en siaj lingvaj teritorioj, simile UEA pere de sia Ĉefdelegito. Sed ĉefan utilon de tia kunestado ni vidus en la debato, kiu okupus sin ne sole pri la faritaĵo, sed ĉefe per la farotaĵo. La ambaŭ centroj deziras aŭdi de siaj membroj opiniojn, proponojn kaj eĉ kritikojn. Tial nia artikolo celas instigi la klubojn (kaj individuajn legantojn) preparoli hejme ĉion, kion ili trovas utila por trakti en Liberec kaj informi jam nun la aranĝantan komitaton (Ing. G. Scholze, Klotildenstr. 6, Liberec) aŭ ĈAE pri tio. Dum la kongreso, sekve de la persona interrilatado povas en mallonga tempo solviĝi aŭ almenaŭ klariĝi multo, kio alie bezonus longan kaj eble eĉ ne kontentigan korespondadon.

Ni atentigas ekzemple je la raporto pri la Ĝenevaj kunvenoj (v. p. 71.) Ĝi enhavas sugestojn, kies realigado atendas nin ĉiujn

aŭtune. Ni do uzu la kongreson por interkonsenti pri ĝi.

Por uzi la tempon plej racie, la jena procedo ŝajnas al ni plej saĝa. Ĉiu nia leganto studu atente la rezoluciojn de la Ĝeneva konferenco, la kluboj debatu pri ili en siaj kunvenoj por esti klaraj, kion ili entreprenos pri ili. Tiuj grupoj, por kiuj la kongresa urbo estas iom malproksima, el kiuj do nemultaj povus veturi al ĝi proprakte, zorgu, ke almenaŭ unu membro partoprenu en la kongreso. Se la kluba kaso ne estas sufiĉe riĉa por pagi la elspezojn de la delegota membro, la klubanoj montru belan ekzempon de la samideana solidareco kaj kolektu inter si la sumon necesan. La ĈAE petas siajn klubojn, ke ili baldaŭ — nepre antaŭ fino de majo — sciigu ĝin pri la nomoj de siaj membroj, kiuj aliĝis en Liberec*.

Kaj kie estas necese, ni vokas tien: Ne plu rigardu nian movadon el loka vidpunkto de via urbo, urbeto aŭ vilaĝo. Via centro ĈAE (kaj GEL) devas esti forta, por ke viaj lokaj sukcesoj efiku ankaŭ ekster via loko kaj por ke la movado estu firma en la tuta lando. Kaj plua ŝtupo en la konstruo: Same UEA kaj K. R. devas esti fortaj, por ke la movado marŝu bone, utiligante la sukcesojn en unu lando por progresigi la aferon en aliaj landoj. Venu do al Liberec por helpi la konstruadon.

Ĝis la revido post 4 semajnoj!

R. H.

* Aliĝilojn petu ĉe S-ro Ing. Scholze, [adr. supre].

LITERATURO

SYDNEY CARTON KAJ LA KUDRISTINO

El „La Rakonto de Du Urboj“ de Charles Dickens.

En la malliberejo de la Conciergerie la kondamnitaj por tiu tago atendis sian sorton. Ili estis tiom nombre, kiom la semajnoj de la jaro. Antaŭ ol ili eliris el siaj karceroj, jam difinitaj estis la novaj loĝontoj; antaŭ ol ilia sango enfluis en la sangon disversitan hieraŭ, la sango, kiu morgaŭ enmiksiĝos kun ilia, jam estis apartigita.

Sydney Carton, sinoferonto por Civitano Evrémonde, estis staranta apud la muro en iom malluma angulo, kiam junulino kun gracia, knabina figuro, ĉarma, delikata vizaĝo, en kiu restis nenia signeto de koloro, kaj larĝe malfermitaj, paciencaj okuloj, leviĝis de sidejo, kie li antaŭe ŝin observis, kaj venis al li por lin alparoli,

„Civitano Evrémonde“, diris ŝi, tuŝante lin per sia malvarma mano, „mi estas malriĉa, juna kudristino, kiu estis kun vi en la malliberejo „La Force“.

Li murmuris responde: „Jes, tio estas vera. Mi forgesas, pri kio oni vin kulpigis?“

„Pri konspiroj. Sed la justa Dio scias, ke mi estas senkulpa pri io tia. Ĉu estas kredeble? Kiu volus konspiri kun malriĉa, malgranda, malfortika kreitaĵo kiel mi?“

La senespera rideto, kun kiu ŝi tion diris, tiel kortuŝis lin, ke larmoj elfalis de liaj okuloj.

„Mi ne timas morti, Civitano Evrémonde, sed mi ja faris nenion kulpan. Mi ne estas nevolonta morti, se la Respubliko faronta tiom da bono al ni malriĉuloj, profitos el mia morto; sed mi ja ne scias, kiel tio povos esti, Civitano Evrémonde. Tia malriĉa, malgranda, juna kreitaĵo kiel mi!“

Kvazaŭ al la lasta homo sur la tero, al kiu lia koro varmiĝos kaj moliĝos, ĝi varmiĝis kaj moliĝis al tiu kompatinda knabino.

„Mi aŭdis, ke oni jam vin liberigis, Civitano Evrémonde. Mi esperas, ke tio estas vera; ĉu jes?“

„Ja, tio estis vera. Sed oni ree min prenis kaj kondamnis.“

„Se estos permesate al mi veturi kun vi, Civitano Evrémonde, ĉu vi volos per-

mesi al mi teni vian manon? Mi ne estas timema, sed mi estas malgranda kaj malfortika, kaj tion fari donos al mi pli da kuraĝo“.

Dum la paciencaj okuloj restis suprenlevitaj al lia vizaĝo, li rimarkis en ili esprimon de subita dubo kaj poste de ĉagreneto. Li premis la malglatajn pro laboro kaj maldikajn pro malsato junajn fingrojn, kaj tuŝis per ili siajn lipojn.

„Ĉu vi estas mortonta por li?“ ŝi flustris.

„Por li, kaj por edzino kaj infanoj liaj. Silentu! Jes!“

„Ho! vi permesos al mi teni vian kuraĝan manon, nekonatulo?“

„Silentu! Jes, mia kompatinda fratino: ĝis la fino“.

Laŭlonge de la stratoj de Parizo la mortveturiloj kvazaŭ tondradas. Dum la pezaj radoj turniĝas, ili ŝajnas displugi longan kurban sulkon inter la popolamaso sur la stratoj. La horloĝoj tuj estas batontaj la Trian, kaj la sulko, plugita inter la popolamaso turniĝas por alveni en la ekzekutejon. La ŝutveturiloj komencas sensargiĝi. La gilotinistoj jam sin vestis kaj estas pretaj. Krakego! Oni elmontras kapon, kaj la ĉestantoj kalkulas Unu. La dua veturilo malpleniĝas kaj formoviĝas; la tria alproksimiĝas. Krakego! Oni kalkulas Du.

La anstataŭanto de Evrémonde, sekvata de la kudristino, eliras. Li ne fordonis ŝian paciencon manon dum la eliro, sed ankoraŭ ĝin tenas laŭ sia promeso. Li ameme ŝin lokas kun ŝia dorso kontraŭ la krakeganta gilotino, kiu leviĝas kaj falas konstante; kaj ŝi suprenrigardas en lian vizaĝon kaj lin dankas.

„Se ne estus pro vi, kara nekonatulo, mi ne povus esti tiel trankvila, ĉar laŭnature mi estas kompatindulineto senkuraĝa; nek mi povus levi miajn pensojn al la Krucumito, por ke ni hodiaŭ povu havi esperon kaj konsolon. Mi kredas, ke vi estas sendita al mi de Dio“.

„Aŭ vi al mi“, diris Sydney Carton. „Fikse rigardu min, kara infano, kaj atentu nenion alian“.

„Mi atentis nenion, dum mi tenas vian manon. Mi atentis nenion, kiam mi fordonos ĝin, se ili rapidos.“

„Ili rapidos. Ne timu!“

La du staras meze de la malpliĝanta amaso da oferotoj, kaj kunparolas kvazaŭ

solaj, okulon kontraŭ okulo, voĉon kun voĉo, manon en mano; kun koroj akordaj, tiuj du infanoj de la Universala Patrino, alirilate tre malsimilaj, kuniĝis sur la mal-luma vojeto, por hejmeniri kune por ripozi sur ŝia brusto.

„Kuraĝa kaj bona amiko, ĉu vi permesos al mi fari al vi unu lastan demandon? Mi estas tre nescianta, kaj ĝi ĝenas min — nur iomete“.

„Diru al mi, kio ĝi estas“.

„Mi havas kuzinon, parencon solan, orfon kiel mi, kiun mi korege amas. Ŝi havas da aĝo kvin jarojn pli ol mi, kaj ŝi loĝas en farmdomo en la sudo. La malriĉeco disigis nin, kaj ŝi nenion scias pri mia sorto, ĉar mi ne scipovas skribi; kaj se mi povus, kiel mi povus al ŝi diri! Estas pli bone, kiel estas“.

„Jes, jes! pli bone estas tiel“.

„Kion mi pensis survoje ĉi tien, kaj ankoraŭ pensas, dum mi rigardas en vian bonkoran, fortan vizaĝon, kiu donas al mi tiom da konsolado, tio estas jena: Se la Respubliko vere faros bonon al la malriĉuloj, kaj ili iam iĝos malpli malsataj, kaj ĉiel malpli suferos, ŝi eble vivos longan tempon; ŝi eble vivos ĝis maljuniĝo“.

„Kio, do, mia kara fratino?“

„Ĉu vi opinias“ — la neplendantaj okuloj, en kiuj estis tiom da toleremo, pleniĝas de larmoj, kaj la lipoj iomete plu apartiĝas kaj tremas — „ke ŝajnos al mi longa tempo, dum mi ŝin atendas en la pli feliĉa lando, en kiun, mi fidas, kaj vi kaj mi estos komplete akceptitaj?“

„Tio ne povas esti, mia infano: tie estas nenia tempodaŭro, kaj nenia malĝojo“.

„Vi tiom konsolas min! Mi estas tiel nescianta. Ĉu mi kisu vin nun? Ĉu la momento venis?“

„Jes“.

Ŝi kisas liajn lipojn; li kisas ŝiajn; ili solene benas unu la alian. La maldika mano ne tremas, dum li ĝin lasas for; nenio malpli ol dolĉa, bela konfido estas en tiu vizaĝo pacienca.

Ŝi iras tuj antaŭ ol li — kaj estas for: la ĉeestantoj kalkulas Dudek Du.

Tradukis *Jane Baird*.



AUG. EUG. MUŽIK:

LA INSULO DE LA ESTONTECO

En mara ondoresalto staris insulo. Ĝi staris tiel jarojn, centjarojn, miljarojn; la maraj ondoj atakis senĉese, sed ankaŭ staris senĉese la insulo; tempe jam ŝajnis, ke ĝi estas perdita — la ondoj renversiĝadis jam preskaŭ tra la tuta insulo kaj la akvo daŭre lokigis interne de la insulo, farante tie sovaĝan lagon, kiu klopodis trabati la insulajn bordojn, unuiĝi kun la maro kaj tiel formi liberan vojon en insulon; sed la insulo tamen staris, tial ke ĝiaj loĝantoj restis fortaj kiel roko en sia konfido pri la firmeco de tiu insulo, ke ili klopodis, ke la sensala akvo de iliaj fontoj ne miksiĝu kun abomena kaj pereiga akvo mara, kaj ke ili laboris senĉese por solidigi sian insulon.

Kaj tie interne oni laboris pli kaj pli en uragano, kiel en trankvilo. Kampisto plugis kaj semis, laboristo frapadis per martelo, instruisto instruis infanojn, saĝulo kaj artisto meditis kaj nobligis kaj virinoj faris siajn laborojn, naskante novan, fortan generacion, helpante al viroj kaj enverŝante al ili fajron de entuziasmo kaj forton de persisteco. Ili havis siajn kantojn, fabelojn kaj gloran pasintecan. Sufiĉis, ke ili estis indaj de la pasinteco. Kaj kiam estis plej malbone, ŝajnis al ili, kiam ili rigardis ĉielon, ke ili vidas tie sanktajn ombrojn de prapatroj, parolantaj al ili gepatran, karan lingvon, kaj ili tuj eksentis novan kuraĝon kaj paciencon. . . . Ili rememorigis pri fratoj malproksimaj . . .

„Kion vi faras, naivaj?“ demandis mara birdaro, fluganta tra la insulo al bordoj pli feliĉaj.

„Ni atendas!“ diris homoj.

„Tio ne sufiĉas“, vokis birdoj. „Kiu atendas, ne ĝisatendos“.

„Sed ni laboras“, respondis viroj.

„Kaj ni persistas!“ respondis virinoj.

„Jes, vi laboru, vi persistu“, vokis maraj birdoj. „Kiu laboras kaj persistas, tiu ankaŭ ĝisatendos. Kun tiu estas Dio!“

Kaj ili flugis malproksimen, portante en mondon sciigon pri homoj, kiuj laboras, persistas, atendas kaj ĝisatendos!

Tradukis *Bedřich Šeránek* (Brno).



SAADI:

RAKONTO

El persa „Golestan“ (Florejo)

Unu el sklavoj de Amrul-Lajs forkuris. Homoj iris tuj post li kaj realkondukis lin. Unu veziro, kiu malamamis ĉi sklavon konsilis ekzekuti lin, por ke aliaj sklavoj ne faru tian agon. La sklavo sin sternis antaŭ Amr sur la tero kaj diris:

— „Ĉion, kio falos sur mia kapo, — se vi trovas tion justa, — Dio ankaŭ konstatos prava, malgraŭ miaj petegoj. Sed sekve de tio, ke mi estas elnutrita en favoroj de tiu ĉi dinastio, mi ne volas, ke en tago de reviviĝo vi okazu responda por mia sango. Se vi volas mortigi vian sklavon, do ekzekutu lin laŭ precizaj komentarioj de leĝo, por ke vi ne estu punota en tago de reviviĝo“.

— „Kiel do mi devas komentarii la leĝon?“ — demandis la ŝaĥo.

— „Liberigu min“ — respondis la sklavo — kaj mi mortigos veziron. Tiam en rekompenco por tio ekzekutu min kaj vi havos por tio la rajton“.

Ŝaĥo ekridis kaj demandis la veziron:

— „Nu, kian opinion havas vi?“

— „Ho potenculo!“ — respondis la veziro. — Por Dio liberigu tiun ĉi friponon, por ke li ne entiru ankaŭ min en la malfeliĉon. Estas mia kulpo, ĉar mi ne atentis la konsilon de saĝuloj, kiuj diras:

Kontraŭ ĵetilpafisto se vi malpacos, pro malsaĝeco kapon vian vi disrompos. Se sagon vi ellasis en malamikon, vin gardu, por vi ne fariĝu lia celo.

Aforismo.

Kiu tralernas sciencojn, sed ne uzas ilin praktike, estas simila al tiu, kiu elsarkas la ĝaŝ denon, sed ne semas la semojn.

El la persa tradukis E. Rebrik. (Recht, Persio)

**PROVERBARO**

Ĉarma estas la libro „Proverbaro“. Oni vidas en ĝi, ke nia Majstro estis poeto. Ni citos kelkajn proverbojn kun ĉeĥa traduko. Legante la tutan verkon de Zamenhof, tre konsilindan al esperantistoj, kiuj intencas perfektigi, vi miros pro la bela stilo kaj popola filozofio.

S ĉuti do toho, pŭl Komenco bona, laboro dila hotovo. duona.

Neŝtĕsti nikdy nepřichází samo. Malfeliĉo venas, malfeliĉon kuntrenas.

Kolik hlav, tolik smyslŭ.

Komu pánbŭh, tomu všichni svatí.

Aby se vlk nažral a koza zŭstala celá.

Po nás ať přijde potopa.

Pro pravdu se lidé nejvíce hněvají.

Nikdo není doma pro rokem.

Páté kolo u vozu.

Řemeslo má zlaté dno.

Práce kvapná — málo platná.

Či chléb jíš, toho píseň zpívej.

Dnes mně, zítra tobě.

Strach má velké oči.

Lepší vrabec v hrsti, nežli holub na střeše

Sousedova kráva více mléka dává.

Kuře moudřejší než slepice.

Drž jazyk za zuby.

Má o kolečko víc.

Papír mnoho snese.

Člověče přičiň se a pánbŭh ti požehná.

Ševče, zŭstaň při svém kopytě.

Panská prosba jako hrozba.

Když není kocour doma, mají myši posvícení.

Co na srdci, to na jazyku.

Šídla v pytlí neutajíš.

Ševcovy děti chodí bosy.

Práce neutěče.

Pečení holubi nelétají do huby.

Kdo dřív přijde, ten dřív mele.

Rozumí tomu jako koza petrželi.

Co tě nepálí, nehas.

En ĉiu kranio regas aparta opinio.

Kiun la sorto karesas, al tiu ĉio sukcesas.

Por ke la lup' estu sata kaj la ŝafo ne tuŝata.

Post mia malapero renversigu la tero.

Kiu diras la veron, havas suferon.

Neniu estas profeto en sia urbeto.

Kvina rado ĉe veturado.

Kiu metion disponas, mizeron ne konas.

Tro rapida laboro, tro malgranda valoro.

Kiu manĝon al mi donas, tiu al mi ordonas.

Ne moku mizeron de alia, ĉar baldaŭ venos via.

Tra vitro de teruro pli grandigas la mezuro.

Antaŭ tima okulo potencigas eĉ kulo.

Pli bona estas „jen prenu“ ol „morgaŭ venu“.

Propra supo brogas, fremda allogas.

Ne prediku knabino al via patrino.

Sidu lango malantaŭ la vango.

Mankas klapo en la kapo.

Al la papero ne mankas tolero.

Dion fidu, sed senfare ne sidu. — Preĝon faru, sed farunon preparu.

Restu tajloro ĉe via laboro.

Sinjoro petas, kvazaŭ dekretas.

Kiam kato promenas, la musoj festenas.

Kion koro sentas, lango prezentas.

Sako alenon ne tenas ĝi baldaŭ elvenas.

Ĉe botisto la ŝuo estas ĉiam kun truo.

Laboro ne estas leporo, ĝi haltos, ne forsaltos.

Ne gutas mielo el la ĉielo.

Unua venis, unua prenis.

Li komprenas predikon kiel bovo muzikon.

Ne ŝovunazon en fremdan vazon.

Tradukis ĉeĥe R. F.


EL SCIENCO


Dr. ST. KAMARYT:

**TEORIAJ FUNDAMENTOJ DE
RADIOTELEFONIO**

La nune unusola taŭga teorio, per kiu oni klarigas aperaĵojn de lumo, elektro, magneto, estas supozo de ekzisto de etero. La etero estas ŝtofo absolute nepeza, pleniganta la tutan senfinan kaj senliman spacon, absolute elasta, penetranta ĉiujn interatomajn spacojn. Ĉar ĝi estas absolute elasta, ĉiu perioda ekscito en ĝi (oscilo) propagas sin laŭradie en ĉiujn direktojn kiel sferforma ondo. Rapideco de propagiĝo de tiaj eteraj ondoj estas 300.000 km dum sekundo; tia estas la rapideco de la lumo, kiu estas absolute la plej granda rapideco atingebla en la spaco. Ekscitebla estas la etero per elektro, per varmo, per lumo, per malkomponiĝo de radioaktivaj elementoj. Ĉiuj eteraj ondoj havas la saman propagan rapidecon (300.000 km/sek), sed tre diversajn longecojn. Oni nomas longeco de ondo la rapidecon de ĝia propago dividitan per nombro de osciloj donitaj al etero dum unu sekundo. Ekz. se oni osciligas la eteron unuoble dum unu sekundo, la longeco de la produktata ondo estus 300.000 km, se oni osciligas la eteron duoble dum sekundo naskiĝus ondo de 150.000 km longa k. t. p. Oni konas ondojn de diversegaj longecoj. La ondoj longaj 30.000 m — 100 m estas elektraj ondoj uzataj en radiotelegrafio kaj radiotelefonio. La ondoj de longeco inter proksimume 0.06 mm ĝis 0.0008 mm estas ondoj varmaj (termikaj), tiuj de longeco 0.0008 mm ĝis 0.0003 mm estas ondoj lumaj (optikaj); la longeco de ultraviolaj radioj estas inter 0.0003—0.0001 mm, de la Roentgenaj radioj inter 0.0000000005—0.0000000001 mm); ankoraŭ pli mallongaj estas la „gamma“ radioj.

Por senfadenaj telefonio kaj telegrafio estas grava la kvalito de la elektraj ondoj, ke ili aperigas la fenomenon de resonado, tute analogian al la samenomita fenomeno akustika. La elektra ondo propagiĝanta tra etero povas vekti la ondon de la sama longeco en kondukilaro respondanta al la elsendanta, kondiĉe se ĝi estas adaptita al la longeco de la kaptata ondo. Tiu agordigo

de la akcepta aparato estas farata per ŝanĝo de ĝiaj meminduko kaj kapacito.

La radiotelefona stacio elsenda produktas la ondojn elektrajn per speciala alternatoro liveranta alternajn fluojn de tre granda ofteco (100.000 periodoj dum sekundo) aŭ per „kantanta arko“. Tio ĉi estas cirkuito konsistanta el du karberoj, inter kiuj malŝarĝigas unudirekta elektra fluo, kaj kiuj estas cirkuititaj kun kondensatoro kaj bobeno. Tra tiu ĉi cirkuito kuras alterna fluo, kies ofteco varias inter kelkaj centoj kaj kelkaj miloj da periodoj dum sekundo.

La produktitajn ondojn elsendas en spacon anteno. Ĝi estas longa, metala kondukilo, kaj ju pli longaj kaj ju pli multaj estas ĝiaj dratoj, des pli grandan kvanton da etero ĝi osciligas.

En cirkuiton de alternatoro (aŭ „kantanta arko“) kaj anteno el ĝi nutrata estas interigita mikrofono, kia estas uzata ĉe ordinara telefono. Se oni parolas antaŭ la mikrofono, oni estigas en intenseco de la ondoj transigitaj per la anteno ŝanĝojn, kiuj sekvas moduladon de la voĉo. Ĝi estas reproduktata per la aŭskultilo de la akcepta stacio.

En la akcepta stacio estas cirkuito konsistanta el anteno kaj aŭskultilo, kiuj estas tute analogiaj al anteno kaj mikrofono elsendaj. Krom ili estas en la cirkuito detektoro, kiu efikigas la ondojn per anteno kaptitajn. La plej bona nun uzata detektoro estas aŭdiono ankaŭ nomata „lampo kun tri elektrodoj“ aŭ triodo. Ĝi estas bazita sur la fakto, ke drataro inkandeskiĝinta elementas spontanee elektronojn (= elementajn erojn de negativa elektro). La ondoj kaptataj per anteno efikas konstateblajn modifojn en la elektra kampo de la aŭdionlampo kaj per tio ankaŭ variojn en la telefono. Tiel la kaptataj ondoj reproduktas en la akcepta aŭskultilo la sonojn osciligantajn la elsendan mikrofonon.



Sferforma = kulovítý, resonado = resonance; agordigo = naladění; meminduko = samoindukce; alterna fluo = [elektra] = střídavý proud; alterna fluo de granda ofteco = střídavý proud velké frekvence; cirkuito = proudovod [sc. uzavřený]; karbero = uhlík; elektra malŝarĝo = elektrický výboj; bobeno = cívka ovinutá drátem [v elektro-technice]; inkadeski = býti zahříván až ke žhnutí; unudirekta fluo = jednosměrný proud; ekscito = vzruch.

NOVA EŬROPO

Fr. Plamínková:

KION ATINGIS LA VIRINOJ EN LA ĈEĤOSLOVAKA RESPUBLIKO

El manuskripto trad. M. Cimrová

LABORKONDIĈOJ

Ĝenerale oni povas diri, ke en publikaj servoj la laborkondiĉoj estas la samaj, kiel por la viroj, tiel por la virinoj.

Ne estis tiel antaŭ la revolucio. Nur elementaraj instruistinoj, kiuj estis plej konsciaj feministinoj, tre baldaŭ konkiris egalan salajron kun la viroj (escepte malgrandajn diferencojn en superpago por loĝejoj). Ĝis la revolucio en plej multaj lernejoj ekzistis la malpermeso edziniĝi. La unuan jaron de nia liberiĝo la instruistinoj atingis leĝan forigon de tiu malpermeso, kontraŭ kiu ili vane batalis multajn jarojn dum aŭstria regado. La instruistinoj de pli malsuperaj kategorioj (fremdaj lingvoj, virinaj manlaboroj, en industriaj kaj sublernejoj) havis tre malgrandan salajron kaj cirkonstancojn sen garantio. En la respubliko tiuj rilatoj plibonigis. En fakoj industria kaj terkultura ankoraŭ nun estas al virinoj farata de la viroj, iliaj kunlaborantoj, maljustaĵo koncerne salajron. Estante en komuna faka organizaĵo, la virinoj estas plej parte reprezentataj de viroj ĉe la ellaborado de kolektivaj laborkontraktoj. Kaj jen! Ofte oni trovas en kontraktoj por virinoj la laborkondiĉojn pli malbonaj ol por la viroj; la virina laboro estas regule taksata kiel tiu de junaj laboristoj ĝis 18 jaroj. Fizika forto estas sole ĉe la viroj taksata, sed la lerteco kaj vigleco de virinoj estas neniel taksataj.

Estis jam dirite, ke antaŭ la revolucio la oficistinoj en publikaj oficejoj estis rigardataj sole kiel provizoraj. En la respubliko per sistema laboro de virinaj reprezentantoj ili estis egalrajtigitaj kun la viroj, precipe en komunumoj, kaj nun ili estas envicigitaj en la samajn rangojn kaj salajroklasojn kiel la viroj. Kompreneble la privataj laboradantoj taksas la virinan laboron neegale. Ankaŭ la laborkondiĉoj de servistinoj (t. n. helpantinoj en hejmoj) estis nun plibonigitaj. Ili organizas sin kaj per tio ili atingas la rekonon. Ĝenerale oni povas diri: la politika liberiĝo de virinoj en ĉeĥoslovaka respubliko signifas ilian liberiĝon kulture, ekonomian kaj socialan.

La plua sukceso de virinoj en Ĉeĥoslovaka respubliko rilatas la tutan nacion: Pligrandigis la intereso de publikaj funkciantoj pri patrineco, pri infanoj kaj pri la suferanta homaro. Tio estas konsekvenco de la senpera partopreno de virinoj en la publika vivo (en komunuma administrado, en leĝodonaj korporacioj kaj en oficejoj por sociala zorgo). Hodiaŭ ĉiu interesas sin pri la socia higieno. El tio devenis kaj tre disvolvigis diversaj privataj institucioj, intense subtenataj de ĉeĥoslovakaj ŝtataj oficejoj, ekzemple: „Ĉeĥa koro“ (Ceské srdce), fondita de la plej granda novotempa ĉeĥa verkistino Růžena Svobodová, kreaĵo kaj ĉefan laboron en ĝi faras la virinoj (Renata Tyršová kaj Anna Podlipná). La tasko de tiu institucio estas zorgi pri infanoj kaj studentoj ne sufiĉe nutrataj kaj nacie subpremataj. Plue „Ĉeĥoslovaka Ruĝa Kruco“ (Československý Červený kříž; ĝia organizantino kaj prezidantino estas virino D-rino Alice Masyřková); en la ĉeĥa lando ĝi estas paca organizaĵo por ĉiuj fakoj de sociala higiena zorgo, precipe por fakoj edukaj kaj helpaj. Ĝi estas organizaĵo disvastigita en la tuta respubliko. — Signifoplena estas la institucio „Zorgo pri patrinoj kaj suĉinfanoj“ (Ochrana matek a kojenců), kies ĉefa gvidanto estas virino (ĝenerala sekretariino Olga Stránská). En 340 sekcioj en tuta respubliko (kiuj havas 131 konsilejojn), oni zorgas pri miloj da patrinoj, antaŭ kaj post la akuŝo, kaj pri miloj da nove naskitoj, per regulaj inspektoj kaj helpa zorgo. Estas interese, ke jam en 70aj jaroj de la pasinta jarcento estis ĉe Ĉeĥoj virinoj, kiuj dediĉis sin al tia laboro. Ekzemple la filino de „Patro de la nacio“, la fama historiografo de ĉeĥa nacio Palacký, fondis mem 17 publikajn zorgejojn kaj 5 gardejojn por infanoj kaj samtempe ŝi zorgis pri edukigo de bezonaj vartistinoj.

Ni atentigas ankoraŭ je „Protekto de Virinaj Intereso“ (Ochrana ženských zájmů) organizaĵo fondita de virino (s-ino Juliana Lančová). Tie koncentriĝas la sociala zorgo pri virinoj, precipe pri tiuj, kiuj estas en nenormalaj socialaj kondiĉoj (forlasitaj, trompitaĵoj, troŝarĝitaj, sen hejmo, sen laboro k. t. p.). Sed ankoraŭ aliaj organizaĵoj de sociala laboro en respubliko trovis fruktodonan kampon, ĉar la ĉeĥa respublika sistemo estas vere demokrata kaj penas forigi ĉiujn socialajn malsanojn kiel per sociala leĝodonado, tiel per provizora sociala zorgo.

ESPERANTA MOVADO

ĜENEVAJ KUNVENOJ

En Genève, sidejo de UEA, okazis en la tagoj 21—22 Aprilo 1924 kvar kunsidoj de Reprezentantoj de Naciaj Societoj Esp. [K. R.] kaj UEA, kunvokitaj de la Centra Komitato Esp. Partoprenis ilin pli ol 40 delegitoj el 13 nacioj. Por ĈAE estis delegita ĝia ĝen. sekr. Hromada. Krom tio el nia lando ĉeestis S-ro O. Sklenčka kiel Ĉefdelegito de UEA kaj S-ro Pitlik, plue por Germana L. E. S-ro Scholze kaj Hell.

La kunvenoj okazis en Napoleona salono de de bela palaco Eynard, lunde je la 10., la 15., kaj la 20:30 horo, marde je la 10a. La preciza protokolo estos publikigita en Esperanto. Ni publikigas sube koncizan raporton pri la plej gravaj punktoj kaj rezolucioj.

Dimanĉe vespere la Ĝeneva Grupo esp. Stelo akceptis la delegitojn en la Zamenhofa domo, sidejo de Internacia Ligo de Virinoj.

Lunde matene S-ro Privat malfermis la konferencon en la nomo de C. K., salutas ĉiujn delegitojn sidantajn ĉe la verda tablo, maldekstre K. R., dekstre komitato kaj ĉefdelegitoj de UEA, legas la kontrakton de Helsinki, kiel bazon de nova aranĝo de la esperanta movado, informas, ke S-ro Stettler, sekve de sia sanstato rezigninta esti prez. de UEA, estis elektita Honora Prezidanto de UEA, kaj transdonas al li kiel modestan signon de granda danko arĝentan florvazon.

S-ro Edmonds, sekretario-kasisto de Konstanta Reprezentantaro konstatas, ke delegitojn sendis la jenaj Naciaj Societoj:

Aŭstra [Schade], Brita [Wadham], Ĉeĥoslovaka [Hromada], Germana en CSR [Scholze], Danzig [Kreuz], Dana [S-ino Blicher], Franca [Poncet], Germana [Kreuz], Nederlanda [Isbrücker], Hungara [Balkanyi], Itala [Toschi], Pola [Kornfeld], Svisa [Stettler].

S-ro Edmonds raportas, ke la Naciaj Societoj respondis la cirkulerojn de K. R. kaj unuanime konfirmis la elekton de S-roj Privat, Chavet, Dietterle, Hromada, Kenn, Page al C. Komitato kaj Merchand kun Edmonds al K. R. S-ro Privat anoncas, ke siaflanke UEA konfirmis la elekton.

Sekvis debato pri financa jaro de K. R., pri kotizoj de Naciaj Societoj al K. R. Fine estis akceptita la propono de la komisiono [Edmonds, Hromada, Stettler, Toschi, Wadham]:

„La „financa jaro“ de K. R. komencas kun la kalendara jaro, sed la Asocioj devas pagi sian kotizon antaŭ la 1. Julio, alie ili ne rajtas voĉdoni depost tiu dato ĝis ili pagos.

Por la 1924 la kotizo de Naciaj Asocioj restas 10% de Membra kotizo de UEA (por CSR do 2 Kč) por ĉiu membro, minimume 5%, sed tiam kun proporcia malpliigo de la voĉdona rajto. Esceptojn fiksis la estraro de K. R.“*)

La II. punkto estis afero de Komerca Eksperimento laŭ la propono de S-ro Edmonds [v. Esperanto, Aprilo].

Post la debato, kiun partoprenis S-roj Scholze, Poncet, Balkanyi, Wadham, Edmonds, Isbrücker, Eilersiek, Kreuz, Ditterle, Döring, Hromada, Gren-

*) Membroj de ĈAE aprobis en sia ĝenerala kunveno pagi por 1924 po 2 Kč, t. e. 10%.

kamp, Pitlik, Delanoue, Stromboli, Prof. Bovet oni decidis:

Oni starigu senpagajn kursojn (de 20 lernantoj) en kelkaj landoj dum novembro por trimonata instruado pri la lingvo.

Tiuj kursoj okazu sub la aŭspicioj kaj kontrolo de reprezentanto de Komercio Ĉambro kaj de bonekonata gazeto.

Pri la starigo de la kursoj oni kiom eble klarigu en la gazetaro, unue por havigi lernantojn kaj due por alŝiri la atenton de la publiko al la eksperimento.

La lernantoj se eble estu komercistoj diversspecaj.

Post la instrua periodo de tri monatoj la kursanoj diverslandaj interrilatiĝu unu kun alia pri komercaj aferoj por provi la efikecon de sia scio pri la lingvo kaj de ĝia taŭgeco por komercaj celoj.

La ateston de la kursanoj tiurilate oni kiel eble plej vaste dissendu por konvinki komercistojn pri la utileco de Esperanto.

S-ro Hromada en la nomo de ĈAE proponas starigi adresaron de komercaj firmoj kaj publikaj oficoj, kiuj povas korespondi en esp-o havante esperantiston inter sia oficistaro.

Post diskuto de S-roj Döring, Privat, Dietterle, Poncet, Jacob, Delanoue, Balkanyi, Hromada la jena propono de Ĉeĥoslovaka Asocio estas akceptita, post ia aldono:

Propono de Ĉeĥoslovaka Asocio

Gravan signifon por propagando kaj por praktika apliko de esperanto havus adresaro de firmoj kaj oficejoj korespondantaj esperante. Bedaŭrinde ni ne posedas tian adresaron kaj, se ĝi ekzistus, ĝi estus treege malgranda kaj modesta, ĉar ĝis nun ekzistas relative tre malgranda la nombro da komercistoj-esperantistoj.

Tamen inter la esperantistaro estas rimarkinda nombro da oficistoj okupitaj ĉe komercaj firmoj kaj publikaj oficoj — ekzemple inter anoj de E. K. en Praha estas 80% da tiaj oficistoj.

Tio signifas, ke ekzistas granda nombro da firmoj, kiuj estas kapablaj korespondi esperante, havante oficiston-esperantiston, sed la publiko ne scias pri tio.

Se oni kolektus adresojn da tiaj firmoj kaj oficoj, oni posedus gravan propagandan kaj praktikan helpilon, kiu farus rimarkindan impreson kiel je ĉiu komercisto tiel je la vasta publiko kaj kiu povus esti gvidilo de ĉiuj esperantistoj serĉantaj per esperanto aĉeto- aŭ vendolokojn.

Konsiderante la grandan propagandan kaj praktikan signifon de tia adresaro, Ĉeĥoslovaka asocio esperantista faras jenajn proponojn:

1. Ĉiu esperantista grupo kaj ĉiu Delegito de UEA starigu nomaron de firmoj kaj oficoj, ĉe kiuj estas okupataj esperantistoj, kaj sendu la nomaron al UEA. Konsento de la firmo estas kondiĉo. Oni klopodu havigi rekomendon de komercaj ĉambroj.

2. Ĉiu esperantista grupo kaj ĉiu Delegito de UEA petu ĉe la firmoj havantaj oficiston-esperantiston, ke ĝi sur ĉiuj siaj leterpaperoj uzadu atenton „Esperanto korespondanta“ kaj sciigu al ĝi, ke ĝia adreso aperos en speciala adresaro senpage [ĉe grandaj firmoj certe ne restos sen impresoj la renkontiĝo de diversfirmaj paperoj kun la rimarko „Esperanto korespondanta“].

3. UEA estu petata, ke ĝi kolektadu la adresojn ricevitaĵajn de la grupoj kaj Delegitoj kaj publikigadu ilin — laŭfakte ordigitajn — komence en „Esperanto“

[ekzemple kiel kvarpaĝa, okaza aldono] kaj en Jarlibro, poste eventuale en speciala adreslibro, eldonata kun helpo de pagitaj komercaj anoncoj.

S-ro Grenkamp proponas: „En persona komerca negocado eksterlande oni nepre uzu esp-on eĉ kun neesperantistaj firmoj“. Akceptita.

III. punkto estis: *UEA kaj Naciaj Societoj.*

Unuflanke oni vidas, ke UEA per sia agado multe helpas al la ĝenerala propagando, farata de la Naciaj Societoj, aliflanke montriĝas devo de N. S. subteni organizon de siaj membroj en UEA por ebligi al ili internacian uzon de esperanto. Diversaj procedoj estis proponitaj en la vigla diskuto, kiun partoprenis Ges-oj Isbrücker, Dietterle, Wadham, Jakob, Balkanyi, Grenkamp, Döring, Rockmann, Stettler. Ĉeĥa delegito proponas kunlaboron de Naciaj Asocioj per komuniko al UEA de siaj membralistoj por ebligi alvokon al tiuj anoj, kiuj ankoraŭ ne aliĝis internacie.

S-ro Edm o n s konstatas internacian rekonon, kiun ĝuas nun UEA kaj kiu estas justa rezultato de la 15jara laboro de UEA, nun oficiala institucio de esperantistoj, dum ke en 1908 ĉe la kongreso de Dresden la tiam juna UEA apenaŭ ricevis sian lokon en la kongresejo. Por manifesti la plenan akordon la reprezentantoj de la Naciaj Asocioj unuanime akceptas la jenan rezolucion:

La Ĝeneva kunveno konvinkita, ke la internacia rolo de esperanto kaj pro ĝi la oficiala organizo de la individuaj esperantistoj (UEA) meritas la plej viglan atenton de la Naciaj Asocioj, varme rekomendas

a) ke ili nepreterlasu okazojn propagandi por UEA kaj montri al siaj membroj la neceson partopreni la internacian movadon,

b) ke ili ebligu la samtempan aliĝon kaj pagon al la Naciaj Societoj kaj al UEA, ĉu kreante specialan klason de membroj internaciaj, ĉu faciligante ĝin almenaŭ per administraj metodoj starigitaj interkonsente kun la estraro de UEA.

IV. punkto estis *Wiena kongreso.* S-ro Schade, ĝen. sekretario de la Loka Kongresa Komitato prezentis raporton pri la stato de la kongresaj preparoj kaj respondis diversajn demandojn de la konferenco. Estos eldonita detala cirkulero, kiun ni esperas publikigi en la venonta n-ro. Hodiaŭ ni nur informas, ke aliĝis pli ol 3000 personoj. La kongresanoj ĝuas faciligojn pasportvizajn kaj fervojajn en tiu grado, kiel vizitantoj de Wienaj Foiroj. Ekz. veturante per rapidvagonaro ili pagos sole tarifon por ordinara vagonaro. Se oni konsideras, ke en ĈSR. estos aranĝita speciala vagonaro por rabatita prezo, rezultas ke precipe la kongresanoj el ĈSR. kaj el norda Eŭropo povas havi malmultekostan vojaĝon.

V. punkto estis *Statistiko kaj Centra Biblioteko.* D-ro Dietterle, fakestro de la C. K. por statistiko, prezentis interesajn dokumentojn pri gravaj servoj, kiujn faris al nia movado la ebleco povi prezenti ciferojn al diversaj oficoj, plendis ke la ĝisnunaj statistikoj pri nia movado estas nesufiĉaj kaj admonis esperantistaron pli serioze okupi sin pri tiu afero. La kunveno akceptis lian proponon, rekomendante ĝin al N. S. por realigo:

K. R. zorgu pri oficiala statistiko — ĉiu nacia asocio por sia lando — de nia movado sur la bazo de komuna demandaro, kaj zorgu, ke oni en ĉiuj landoj tuj komencu la laboron, decidante pri starigo de statistiko kaj pri kolektado de la materialo por

la jaro 1924. K. R. instigu siajn anojn, ke oni forsendu la responditajn demandarojn je la fino de la jaro aŭ kelkajn tagojn post ĝi, al la nacia asociestro kaj ĉi tiu jam hodiaŭ donu la definitivan promeson, sendi la materialon al C. K., por ke oni povu prezenti la prilaboritan tutan materialon antaŭ la XVIIa kongreso 1925. Komence sufiĉos tre simpla statistiko: 1. ĝenerala — raportanta pri: a) la urboj kaj lokoj, kie ekzistas Esperanto-grupoj, b) pri la nombro de la grupoj, c) pri la nombro de la grupoj, d) pri la nombro de la okazintaj kursoj, e) pri la nombro de la kurspartoprenintoj. 2. speciala — raportanta pri „Esperanto kaj lernejoj“: a) urboj kaj lokoj, kie oni enkondukis Esperanton en lernejoj, b) nombro kaj speco de la lernejoj, c) nombro de l' instruistoj, d) nombro de la lernintoj. La aranĝo de la tuta afero estas tasko kaj devo de la unuopaj naciaj asocioj unuigintaj en K. R.

Tre serioze estis pritraktata la afero de la Centra biblioteko en Paris.

VI. punkto estis *Gazetara servo* laŭ la raporto de S-ro Hromada, fakestro de C. K. La debato akcentis la neceson, ke la gazetara servo bone funkcia en kelkaj landoj estu aranĝita en ĉiuj landoj. La kunveno unuanime voĉdonis la jenan deziresprimon:

„La konferenco Ĝeneva aŭdinte la raportojn de S-ro Hromada kaj de la diversaj Naciaj Societoj (Brita, Ĉeĥoslovaka, Franca, Hungara, Itala kaj Nederlanda) pri la gazetara servo en iliaj landoj, danke aprobas ilin kaj esprimas la deziron, ke ĉiuj Naciaj Societoj, reprezentitaj en K. R., starigu jam en la jaro 1924 la gazetaran servon esperantan, interkonsentante pri tio kun Centra Komitato.“

La estroj de la gazetara servo de la suprenomitataj nacioj kunvenis marde tagmeze en la hotelo Residence kaj sur la bazo de la raporto verkita de S-ro G i n z, ili pritraktis la detalojn, konstatinte ke la procedoj de tiu servo en iliaj landoj estas pli malpli samaj, montrante bonajn rezultatojn.

Jen rapida informo pri la kunvenoj de Ĝenève. Trankvile neĝenataj de diversaj amuzaj kaj aliaj aranĝoj dumkongresaj, la 40 delegitoj povis pritrakti la bezonojn de la movado kaj interkonsenti pri diversaj aranĝoj. Valora estis ankaŭ la ebleco de persona rilatado ekster la kunvenoj, faciligita per tio, ke la plej granda parto da delegitoj loĝis kaj manĝis en la sama hotelo. — Restas nun pridiskuti la rekomendojn kaj decidojn de la Konferenco en ĉiuj Naciaj Societoj kaj prepari ĉion, por ke aŭtune ĉiuj aranĝoj interkonsentitaj jam ekfunkciu. ĈAE jam nun akceptas informojn de siaj kluboj pri tio, kion ili entreprenos por realigi ilin.

R. H.



IIa ĈEĤOSLOVAKA ESPERANTO-KONGRESO LIBEREC, PENTEKOSTON

IIa RAPORTO.

La antaŭlaboroj por la kongreso jam progresas kaj la invitiloj kun la aliĝiloj estas forsenditaj. La provizoran programon la L. K. K. jam komunikis per la unua raporto kaj sciigas ankoraŭ, ke la ŝtate ekzamenitaj ĝeinstruistoj de Ĉeĥoslovakio

intencas aranĝi fakkunsidon kaj fondiĝon de unuiĝo de la ŝtate ekzamenitaj geinstruistoj en Ĉeĥoslovakio. La L. K. K. envicigis ĉi tiun fakkunsidon en la programon por lundo la 9an de junio je la 8a matene.

Karaj en- kaj eksterlandaj gesamideanoj, vizitu laŭeble tre multnombre nian kongreson kaj estu ĉiuj tre kore bonvenataj en la malnova „drapfaristurbo“ Reichenberg.

Por konvenaj loĝejoj en hoteloj kaj en privataj domoj je prezo de 16 ĝis 18 kronoj po lito (ankaŭ komunaj loĝejoj por la junularo kaj studentaro ekzistas je malalta prezo) kaj por bona komuna tagmanĝo je 9 kronoj por persono, la L. K. K. zorgis kaj ankaŭ la festprogramo estas tiamaniere aranĝita, ke ĉiuj gekongresanoj estos kontentigitaj.

Laŭ nia devizo: „Post laboro la amuzo“, ni intencas tre diligente labori dimanĉon dumtage kaj vespere ni volas b ne amuziĝi. Lundan antaŭtagmezon ni daŭrigos la labor-kunsidojn kaj posttagmeze ni volas ekskursi komune en la tre bela ĉirkaŭaĵo de Reichenberg.

Kiu ankoraŭ ne ricevis aliĝilon, bonvolu tuj postuli ĝin de la L. K. K. (Adreso: Esperanto-Kongreso Reichenberg.)

Loka Kongresa Komitato.

LINGVA FAKO

PĚKRLAD IV. TEXTU

VYSLEDEK

Překlad zaslalo 18 ĉtenářů. Velmi dobré byly práce, které zaslali: Dokoupil Rud. Třebíč, Hoffmannová B. Praha, Jandík A. Přebuz, Klenka F. Bohdaneč, Mrázková T. Olomouc, Tyl A. Prostějov. Losem přirčena premie prvním třem a byla jim zaslána kniha povídek Arbesových v esp. překladu J. Grňi.

Praktiku spirekzercojn! ^{1]} La spirado estas ankoraŭ pli grava ol la manĝado, ĉar oni ne povas vivi sen ĝi. ^{2]} Spiru freŝan aeron kaj tial diligente aerumu vian loĝejon. Aerumita loĝejo ankaŭ pli bone hejtigas^{3]} ol loĝejo fermita. Per spirekzerco vi plivastigos vian torakson^{4]}, malebligos infektigon per tuberklozo^{5]} kaj se vi ĝin havas, iĝos al vi pli facile^{6]}. Per profunda spirado^{7]} vi ricevos nesupozitajn^{8]} fortojn, ĉar per spirado vi ĉerpas senpere en vin^{9]} la universan energion, enhavatan^{10]} en la aera oksigeno.

^{1]} ne spertojn! ^{2]} ĉar se ĝi [sen spirado] ne estas eble vivi, ^{3]} estas pli bone hejtebla, varmiĝebla, ^{4]} brustkorbon, ^{5]} fitizan infekton, ^{6]} via stato pliboniĝos ^{7]} profunde spirante, ^{8]} neatenditajn, neantaŭviditajn, neantaŭsentitajn, ^{9]} vi senpere enĉerpas, ^{10]} entenatan.

VI. TEXT K PĚKRLADU

Štěstí je slovo proto tak opakované v prácích větách lidských, poněvadž je synonymem toho, čeho člověk nemůže dosáhnouti. A nejen že nemůže, ale ani nechce. Ať to zní sebe paradoxněji: člověk nechce, aby měl štěstí, nýbrž chce býti nespokojen, neukojen, konec konců nešťasten. Není málo lidí, kteří s potěšením vyprávějí o svém žalu, jeden druhého překřikující tvrzením, že jeho žal je ze všech žalů nejhlubší, nejoprávdovější a nejkrásnější.

Dr. Stan. Kamaryt (El lia libro „O dvoji pravdě“.)

KRONIKO EL ĈEĤOSLOVAKIO

Oficiala raporto de Ĉsl. Asocio Esp.
laŭ senditaj informoj.

Zamenhofan vesperon aranĝis la 17. Februaro la vigla E. K. Ústí n./Orl. Partoprenis 85 p., ankaŭ el Jablonné n./O. kaj Lanškroun. La klubo kolektis entute 450 Kč por la Monumento de Zamenhof (3 funtoj st.)

Armeo kaj esperanto. En Brno prof. Friedrich parolis antaŭ soldatoj kaj oficiroj de telegrafa bataliono No 6.: Pri esp. kaj ĝia signifo por radiotelefonio — La 6. Aprilo S-ro prof. Sprinc parolis en Olomouc pri „Radiotelefonio kaj artefarita lingvo en internacioj rilatoj“. Ĉeestis 120 p., plejparte soldatoj kaj oficiroj, ĉar la garnizonestro generalo Šnejdár ek rekomendis oficiale la ĉeeston.

Policistaj kursoj. En Brno S-ro Barvíř instruas dufoje semajne 120 policianojn en specialaj kursoj policaj.

Paroladoj. F-ino Šupichová parolis pri la problemo de l. i. la 27. Febr. en Jednota humanní a výchovná; la 6. Apr. en E. Rondeto pri klopodoj de Comenius por l. i.

REGIONAJ KUNVENOJ

La r. k. de Norda Moravio okazis en Olomouc dimanĉe la 6. Aprilo en YMCA.

Ĉeestis 7 p. el Olomouc, Bystřice p. H., Odrlice, Přerov kaj Prostějov. Prezidis S-ro Kudela, protokolis S-ro Hochman. Sekvis raporto de la delegitoj pri la agado en iliaj lokoj. La venonta kunveno okazos komence de julio en Hranice. Sekvis propaganda parolado publika [v. supre].

Posttagmeze amuzas kunveno. La 4jara fileto de S-ro Neuzil rikoltis grandan aplaudon por du kantoj; la recitaĵo de lia 11 jara filo tre plaĉis; la prezento de Semajno de liaj ĝelernantoj kaŭzis multan ridon. La muzikan parton prizorgis Dro Matuřa, kantojn S-ro Hub. Lumbildan paroladon pri Konstantinoplo diris S-ro Kudela. A. K.

LOKAJ RAPORTOJ

Nymburk. La ĝen. kunveno de E. klubo okazinta la 14. Marto elektis: prez. S-ro Tyl, sekr. Buka Jos., Nymburk, Smetanova 719.

Praha. Rondeto de Esperantistinoj aranĝis sian ĝen. kunvenon la 18. Marto kaj elektis: prez. F-ino Hlaváčová Klema, instruistino; sekr. S-ino S. Zedníková, Praha II., Trojanova 10.

LABORISTA LIGO ESPERANTISTA

Ĝenerala kunveno de L. L. E. okazis 24an de Februaro en Plzeň, en Laborista domo „Peklo“. Ĝeneralan kunvenon malfermis prezidanto Pešek, kiu salutakceptis la reprezentantojn de diversaj institucioj kaj societoj kaj multajn gesamideanojn. Poste parolis k. Pešek pri la tutjara movado esperantista inter laboristoj kaj pri situacio de L. L. E.

Poste prezentis siajn raportojn la funkciuloj kiuj estis kun streĉa atento aŭskultataj; nome plaĉis la raporto de la sekretario kaj de la kasisto. La revizoroj kiuj trovis ĉion en la plej bona ordo, proponis, ke estu donita al funkciuloj la absolutorio, kio estis aprobita.

Post la raportoj de la funkciuloj paroladis k. Pech kaj Votrubeč pri la utileco de Esperanto.

Prezidanto dankis al eksfunkciuloj por ĉio, kion ili ĝis nun faris por L. L. E. kaj sekvis la paŭzo.

Post paŭzo estis elektotaj kaj kiel prezidantoj oni denove reelektis k. Pešek. La proponoj de malnova komitato estis ĝenerale akceptitaj. Raporton de UEA prezentis k. Keiser kiel delegito de UEA ĉe L. L. E. Raporton de S. A. T. prezentis k. Burda. Post diversaj proponoj kaj demandoj fermis la prezidanto ĝeneralan kunvenon.

Komitata kunveno de L. L. E. okazis tuj post ĝen. kunveno kaj kiel funkciuloj estis elektitaj jenaj komitatanoj. I. vicprezidanto Büchl V., II. vicprezidanto Hovorka I., sekretario Král Jan, kasisto Melková K. La korespondadojn oni adresu al: Laborista Ligo Esperantista en Ĉeĥoslovakio, Plzeň „Peklo“.

Laborista societo Esperantista, Plzeň-Karlov, aranĝis la 18an de Februaro publikan paroladon pri Esperanto. Parolinto k. Büchl V. Malfermiĝis kurso por 23 komencantoj. Kunvenoj okazas lunde de la 7a vespere en biblioteko de loka kantino. La gastoj estas kore invitataj.

Laborista societo esperantista Plzeň I. Regulaj kunvenoj okazas ĉiumerkrede. Jaŭdon la 20an de Marto oni malfermis kurson por komencantoj kun parolado de k. Pešek, prezidanto de L. L. E. (? p.) Amuzaj vesperetoj de esperantistoj en Plzeň okazadas ĉiudimanĉe en kafejo de „Peklo“.

Laborista Ligo Esperantista en Plzeň. Raporto el komitata kunveno je 6a Marto en Laborista domo „Peklo“. Protokolo el lasta komitata kunveno legita kaj aprobita. Raporto de la sekretario: ricevis leteron de S. A. T. el Parizo, leteron de Ĉ. E. I., leteron de Asocio de „Laboristaj gimnastikaj societoj“ el Praha, leteron de Asocio de Turistoj k. a. Forsendis 2 leterojn france skribitajn al Bern por kongreso de poŝtistoj en Stokholmo, 1 leteron al ministerio de poŝto kaj telegrafo en Praha. Leteron en Vienon, ke ili sendu al Ligo la aliĝilojn je XVI. kongreso en Vieno. Leteron al kamarado Feith en Vieno.

La societoj kiuj estas aranĝontaj kursojn por komencantoj devas komuniki tion al centra komitato kaj post la fermo de kurso sendi la diagramon de la vizitantoj.

Laborista societo esperantista Letná apud Plzeň malfermas kurson por komencantoj en loka lernejo.

PROPAGANDU!

Chcete-li informovati někoho o esperantu krátce, jasně a solidně, zašlete mu dva právě vyšlé letáky „Klubu esperantistů v Praze“ „Esperanto – jednotné jazykové pojítko národů“ (2 str. za 20 hal.; 100 kusů 15 Kč, 500 k. 40 Kč) a časopisu „La Progreso“ „Krátký kurs esperanta“ [4 str. za 50 hal.; 100 ekzemplářů 40 Kč, 500 ekz. 150 Kč]. Opatřte všem svým známým **neesperantistům**, zejména osobám ve vašem místě významným!

Každý spolek esperantistů zašle administraci „La Progreso“ [složenkou šekového úřadu] 150 Kč a obdrží za ně 500 výtisků letáků „Krátký kurs esperanta“. Tyto letáky rozdělí mezi své členy s povinností, aby je prodávali ve svém okolí, úředníci v kanceláři, dělníci v dílnách, profesori a učitelé ve školách atd. Tyto letáky bude prodávati při přednáškách, schůzích a zábavách svých i cizích. Poněvadž prodáním 300 výtisků kryje se úplně náklad, spolek z 200 ostatních výtisků zdarma na svůj náklad pošle po 1 výtisku všem členům profesorských a učitelských sborů ve svém místě, všem členům obecního zastupitelstva, všem místním redakcím, úřadům, spolkům a vynikajícím jednotlivcům. Totéž učini v okolních obcích, kde nejsou esperantisté. Doporučuje se k tomuto letáku připojit ještě leták „Esperanto“, jazykové pojítko.

DIVERSAJ SCIIGOJ

- La venonta n-ro aperos la 27 Majo.
- Tiun ĉi n-ron ni iom prokrastis volinte alporti la raporton pri Ĝenevaj kunvenoj.
- Pro teknikaj kaŭzoj ni ne povis ankaŭ tiun ĉi fojon presigi bildon.
- La tria [januara] n-ro estas elĉerpita kaj ne povas esti liverata al la novaj abonantoj. Ne povinte akiri ĝian resendon de la nepagintoj, ni danke akceptus tiun n-ron de bonvolaj abonintoj, kiujn ni rekompencus per egalvalora presaĵo.
- Pri la libroj anoncataj en La P. ni petas atenti, ke iliaj prezoj ŝanĝiĝas laŭ la kurzoj, ĉu malaltiĝante aŭ kreskante. Tial valoras ĉiam sole la prezoj de la lasta n-ro.
- S-ro Ginz O., komitatano de ĈAE kaj Videl, forestas dum majo kaj petas indulgon de siaj korespondantoj. En urĝaj okazoj skribu al ĈAE.
- Ankaŭ tiun ĉi fojon ni ne povis pro manko de loko enmeti kelkajn rubrikojn kaj informojn. La aŭtorojn ni petas ne plendi. Kulpaj estas tiuj, kiuj lasas nin elspezi monon por presi iliajn ekzemplerojn, kiujn ili ne pagas. Se ĉiuj pagus, ni povus pligrandigi kelkajn numerojn.

NIA KRONIKO el Ĉeĥoslovakio estas destinita por eksterlanda informo. Tial ni aranĝas ĝin ne laŭloke, sed tiamaniere, ke la leganto tuj vidu, kiom da novaj kursoj ekzistas, ĉu inter ili iu speciala (por fervojistoj, soldatoj, poŝtistoj k. s.), kiuj novaj kluboj fondiĝis, kluj ekspozicioj estis aranĝitaj ktp. Ni estus feliĉaj, sed ankaŭ en aliaj gazetoj naciesperantaj ni trovus la kronikon tiel aranĝita, ĉar tio ebligas facile ricevi bildon pri la esp. movado en la koncerna lando dum la pasinta monato. La plimulto ja ne legas kronikojn en niaj gazetoj, sed propagandistoj kaj estroj de gazeta servo bezonas tion fari. Ni faciligu al ili, ke ili ne bezonu vadi en la amaso da samaj, ripetigantaj vortoj, sed trovi tuj la kernon.

PROPAGAČNÍ ODBOR

PROTI ESPERANTU A PRO NĚ

Potřebují-li mezinárodní kongresy esperanta?

Ch. Bourlet, zesnulý francouzský matematik uveřejnil kdysi v „La Revuo“ zajímavý obrázek z V. kongresu matematiků, který se konal r. 1912 v Cambridge. Ukazuje zmatek, způsobený bábelem jazyků: „Chaos začal, píše p. B., hned v první schůzi a trval až do samého konce. První schůze konala se 5. září večer. Předsedal profesor D. E. Smith z university Columbia ve Spojených Státech severoamerických. Každý národ měl dva zástupce v předsednictvu. Prof. Smith zahajuje schůzi promluvil dlouhou anglickou řeč a očividně se snažil, aby vše jasně vyslovoval. Když domluvil, povstal prof. Webster, též Američan a promluvil také několik slov. Pak nastalo ticho. Všichni něco očekáváme. Tu zase spatříme jakýsi neklid u prof. Smitha, který náhle se zase zvedá, promlouvá několik slov a zase usedá. Nové ticho. Náš president, s posuňky, v nichž zračí se neklid a zmatek, obrací se k prof. Fehrovi a něco mu šeptá. Prof. Fehr vstává a mluví k nám nejprve francouzsky, po té německy: „Pánové, náš president p. Smith, konče svoji řeč, navrhoval Vám jména panů předsedů pro příští schůze, prosil Vás, abyste hlasovali a jest velmi překvapen, že nikdo nehlasuje pro ani proti!“ Po té následoval hlasitý smích a ruce se rázem zvedaly. Nikdo z přítomných, kromě krajana Smithova p. Webstera nerozuměl ani jedinému slovu z řeči Smithovy, ba nepoznali jsme ani svých vlastních jmen zkomolených, asi angloamerickou výslovností. Na kongresech matematiků možno užívatí řeči anglické, francouzské, německé, italské, ale žádný rozhovor, žádná výměna názorů není možná, poněvadž řečník, jenž právě mluví nebo předčítá, neví co říkal řečník, jenž mluvil před ním. Srozumění je možno pouze překládáním, ale toto překládání do 4 řečí je něco hrozného. Já, který jsem se dostavil na tento kongres po esperantském kongresu krakovském, konaném r. 1912, cítil jsem nápadný kontrast více než kdokoliv. V Krakově tisíc lidí různého věku a vzdělání se bavilo a hovořilo jako lidé téhož národa, zde v Cambridge sedí šest set učenných lidí — a jeden druhému nerozumí“

(R. F.)

Práce pro esperanto v Rusku. Komunistická universita východních národů v Moskvě zahájila vyučování esperantu. Pro množství přihlášek bylo nutno zříditi dva kursy tohoto jazyka. Posluchači jsou političti uprchlíci z Číny, Koreje, Turecka, Recka, Bulharska, Turecka a z jiných východních zemí.

Výnos pruské vlády o esperantu. Soupis esperantských učitelů v Prusku nařízený tamním ministerstvem vyučování dopadl tak příznivě, že toto ministerstvo vydalo dne 10. března t. r. výnos, jímž se všeobecně povoluje nepovinné vyučování esperantu na pruských školách. Prusko následuje v tom příkladu druhých německých států.

Dělničtí esperantisté ve Finsku. Finští dělníci se chopili nyní samostatně práce pro esperanto. Dobří odborníci zahájili na mnoha místech kursy tohoto jazyka a dnes po krátké době své činnosti jsou v popředí finského hnutí esperantského. Soci-

alisté Finska hodlají používatí esperanta ve velkém měřítku ke stykům se zahraničím a budou mezi takto účinně potíratí propagaci reakčních kruhů finských, které již dávno užívají k svým cílům tohoto jazyka.

Řeč anglického krále — esperantem do světa. Dne 23 dubna zahájil anglický král velkou Britskou výstavu a jeho zahajovací řeč byla rozšířena radio-telefonem přímo z výstaviště do celé Anglie. Stejně dne večer rozeslala londýnská radiostanice [značka 2. L. O., vlna 365 m] úplný esperantský překlad této řeči, aby její obsah se stal známý i v zemích neanglických.

MORTIS

Stark Jan, magazenoficisto, membro de E. R. Slezská Ostrava, fariĝinte viktimo ĉe la granda katastrofo en vilaĝo Heřmanice ap. Sl. Ostrava, kie la 19. Marto 1924 eksplodis grandega magazeno de dinamito, provizanta ĉiujn minejojn de la regiono Ostrava-Karvin.

Honoro al lia memoro!

Ni rekomendas al vi la jenajn

Libroj de Hirt & Sohn Leipzig

Kč

- Internacia Mondliteraturo.** Sbirka 15 svazků vhodné četby, 70—80 str. po 8.—
- 1. Goethe Hermano kaj Doroteo,
- 2. Niemojewski: Legendoj,
- 3. Turgenev: Elektitaj noveloj,
- 4. Raabe, La Nigra Galero,
- 5. Hildebrand, El la „Camera Obscura“,
- 6. Irving: El la skizlibro,
- 7. Chamisso: La mirinda historio de Petro Schlemihl,
- 8. Ŝtamatov: Nuntempaj rakontoj,
- 9. Salom-Alehem: Hebreaj rakontoj,
- 10. Puŝkin: Tri noveloj.
- Stranga Heredaĵo** [Luyken] orig. roman 320 str. 24.—
- Abismoj** [J. Forge] orig. roman 150 str. 14.—
- Internacia kantaro** [Bennemann] 64 pismě text 4.—
noty 13.—
- Enciklopedia Vortaro** [Wüster] I. parto [A-Ĉ] 160 str. 100.—
- Esperanto-Deutsch**, slovník od Bennemanna 176 str. váz. 28.—
- Lippman: Lingvaj respondoj de Dr. Zamenhof.** Nĕm. zpracování s doplňky a vysvětlivkami 70 str. . . . 7.—
- Historio de Esp.** [Privat] 74 str. . . 12.—
- Vivo de Zamenhof** [Privat] 109 str. . 15.—
- La Vendreda Klubo.** 11 orig. ĉl. 115 str. 12.—
- Thora-Goldschmidt: Bildotabuloj.** 36 36 bildoj kun teksto. 104 str. . . . 20.—

Obstará adm. LA PROGRESO PRAHA VII.-333.

Opatříme Vám následující knihy:

SPISY ZAMENHOFOVY:

Fundamento eldono 5 lingva . Kĉ 8—
 Fundamento, kun ĉeĥa trad. disvendita
 Fundamenta Krestomatio
 460 str. " 24—
 Fabeloj de Andersen " 16—
 Georgo Dandin " 8—
 Hamleto, Shakespeare, 170 str. " 14—
 Ifigenio, Goethe, 108 str. " 15—
 Proverbaro esperanta, 82 str. " 11—
 Rabistoj, Schiller, 144 str. " 11—
 Revizoro, Gogol, 100 str. " 11—
 Esenco kaj estonteco de la lingvo
 internacia, esp.-france disvendita

ZAMENHOFOVY PŘEKLADY BIBLE:

Genezo, Eliro, Levidoj, Nombroj,
 Readmonoj po Kĉ 8—
 Psalmaro, reeldonota en Anglio " —
 Sentencoj de Salomono " 5—
 Predikanto " 2:50

DÍLA DRA K. BEINA (KABE):

Faraono, Bol. Prus, 3 sv. 600 str. po " 16—
 Fundo de l' mizero, Sieroszewski " 4—
 Pola Antologio, krátké povídky " 8—
 Halka, opera, text " 5—
 Interrompita kanto " 4—

VZORNÁ DÍLA JINÝCH AUTORŮ:

Mazepa de Slowacki, tr. Grabowski Kĉ 8—
 Kaatje de P. Spaak, 111 str. " 11—
 Karmen, novelo de Mérimée " 5—
 Reĝo de la montoj, napínávy
 román ilustr., 248 str. " 24—
 Imenlago, novelo de Storm " 4—
 La kvar evangelioj en unu
 rakonto, 200 str. " 8—
 Fatala ŝuldo, román 318 str. " 14—
 Salome de Wilde " 2—
 Rakontoj de Arbes, 135 str. " 6—
 Koboldo Ondra, Mahen " 5—
 Ĉeĥa literaturo. Dr. Novák Arne " 8—
 Tra la mondo II. ĉitanka " 10—
 Bukedeto, 7 povídek, 48 str. " 4—
 La Esperantisto en Germanio " 20—
 Moravia karsto " 5—

SLOVNÍKY:

Tittl: Vortaro esp. ĉeĥa v. 7-50) Kĉ 5—
 Kühnl-Procházká: Slovník
 ĉesko-esp. " 20—
 Kabe. Enciklopedia vortaro, 175, v. 22—
 Verax: Vortaro (techn. slova) v. 32—
 Boirac: Plena vortaro esp. 3 sv. " 50—
 Wüster: Maŝinfaka vortaro " 15—

Kamaryt: Jazyk mezinárodní . . . Kĉ 8—
 Kotzin: Na obranu esperanta " 3—
 Šupichová: Učebnice esp. " 9:60
 Žďárský: Učebnice esp. " 20—
 Bouška: Škola esperanta, úplná " 30—

Obstaráme za předem zaslaný obnos
 plus 10 procent porta, mimo daně z obratu.

LA PROGRESO, Praha VII., Sochařská 333.

**LA SOLA EN ESPERANTUJO
 BES-adresaro de Esperantistoj**

el ĉiuj landoj

ĵus aperis en 5-a eldono. Helpe de facile kompreneblaj mallongigoj kaj per registro laŭ okupoj ĉiu facile trovas taŭgan korespondanton! — Ĉiu aĉetinto rajtas je premio en la prospekto menciitaj. Prezo 6 Kĉ 1.-Fsv, por landoj malbonvalutaj speciala rabato. — Mendu tuj tiun ĉi unikan broŝureton! — Prospekto senpaga. Bohema Esperanto-Servo, Ing. Molnár Praha II., Žitná 44.

~~~~~  
*literaturamanto*  
**Ĉiu** *propagandisto*  
*serioza esp-isto*  
 abonu

la monatan, bele ilustritan revuon

**Literatura Mondo**

Red. kaj Adm.:

Budapest VI. Andrassy ut. 81

Jarabono (10 n-roj) 10 fr. sv. aŭ 45 Kĉ  
 Ponumera pago (4:50 Kĉ) ebla ĉe  
 la Administracio de La Progreso.

~~~~~

ĈU VIAJ NERVOJ ESTAS

MALSANAJ?

ĈU VI NE POVAS DORMI?

Uzu elektrogalvanan aparaton sistemo

"VOLMUT"

havebla kaj videbla ĉe

Ing. B. MOLNÁR

Praha II., Žitná 44 Ĉeĥoslovakujo.

